# EKO

Esperiga Komuniko

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

**Enhavo**


- TEJO kun laborteamo kaj AMO
- 300 en lingva simpozio
- Nova AMO-komisiono
- Greziljono pli detale
- Vivkadra Simulado



Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

*EKO 2020-48 sendita el Budapeŝto, la 6an de oktobro*

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en multaj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Pli ol dumil kun plusendoj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA



## Nova Estraro de TEJO aktivas – jen la ŝlosilo

La junulara sekcio de UEA havas novan estraron, kiu oficas ekde la komenco de septembro, post unu-monata transira periodo, en kiu la nova kaj la antaŭa estraroj kunlaboris por la pluiro de la unuopaj laborterenoj. Necesas emfazi, ke la laboro kaj projektoj de TEJO gravas ne nur por junuloj, ne nur por iliaj membroj, sed por la tuta Esperanta komunumo. TEJO publikigis laŭdinde detalan skemon de la respondecoj de la unuopaj estraranoj. Ni resumas la situacion ĉi tie kaj aperigas la diagramon en la akompana PDF kaj krome alkroĉas ĝin. Jen la listo kun la loĝlandaj indikoj (per ISO-kodoj) kaj la ĉefaj respondecoj.

**Prezidanto**: Charlotte Scherping Larsson, DE, kunordigo, eksteraj rilatoj
**Vicprezidanto**: Carlos Pesquera Alonso, ES, Kongresoj, Interkontinentaj projektoj.
**Vicprezidanto**: Tomáš Stano, SK, Aktivula Trejnado, Eŭropaj Projektoj
**Ĝenerala Sekretario**: Konstanze Schönfeld (Tuŝka), DE, eksteraj rilatoj.
**Kasisto**: Mung Bui, VN, (Feliĉa), financoj.
**Estrarano**: Karina Oliveira, KR, Edukado, Scienco kaj Kulturo
**Estrarano**: Klára Ertl, LU, Talento, rilatoj kun UEA.
**Estrarano**: Rogier Huurman (Roĉjo), NL, Merkatiko kaj informado
**Estrarano**: Robert Nielsen, IE, landa kaj faka agado

TEJO aktive kunlaboras pri AMO 69, okazanta fine de novembro kun la temo 'Varbado de junuloj en Eŭropo'. Ni ege diskutas pri la preciza kontribuo.




# 300 partoprenintoj por lingvistika simpozio

La 5a Interlingvistika Simpozio kun titolo «Rolo de lingvoj en interkultura komunikado» okazis en septembro 2020 en virtuala formo kun rekorda nombro da partoprenantoj (pli ol 300 el pli ol 50 landoj) kaj preskaŭ 60 prelegoj en 3 lingvoj (Esperanto, angla k pola).
La programo, resumoj kaj raporto legeblas ĉe:
http://interl.home.amu.edu.pl/interlingvistiko/simpozio2020.html

Ilona Koutny, Gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj kiu organizis la simpozion

# AMO havas komisionon

La respondeca estrarano por la AMO-programo ĵus komunikis al mi la konsiston de la komisiono, kiun la estraro de UEA decidis formi jam jarkomence.

- Mireille Grosjean, alportas ligon kun la instruistoj kaj edukaj temoj
- Michael Boris Mandirola, alportas ligon kun TEJO kaj ilia programo de aktivula trejnado
- Sara Spano, same, kaj kiu pli frue respondecis en la UEA-estraro pri AMO.

- Michela Concialdi, IT, profesia trejnisto.
- Charlotte Sherping, alportas tre rektan ligon kun TEJO, kiu havas tradicion prizorgi AMO-seminariojn

# La kontribuo de TEJO al la AMO-programo

AMO 1: HU Mar 2014: Okazinta kadre de la junulara renkontiĝo JER (organizita de HEJ)
AMO 3: BR  Jul 2014: Okazigita kadre de la IJK en Fortaleza, TEJO prizorgis la programon.
AMO 8: DE Dec 2014: Okazigita kadre de junulara jarfina kunveno en Weiswasser.
AMO 9: BR Jan 2015: Okazigita kunlabore kun BEL kaj BEJO en Manaus.
AMO 10: IT Aprilo 2015: Okazigita kadre de IJF. TEJO ĉefrolis, kune kun subvenciado.
AMO 14: DE Jul. 2015: Okazigita en la IJK en Wiesbaden. TEJO ĉefrolis.
AMO 17: HU Dec 2015: Okazigita kadre de IJS en Eger. TEJO ĉefrolis.
AMO 19: BR Jan 2016: Okazigita en la brazila kongreso, kunlabore kun BEL kaj BEJO.
AMO 22: IT Apr 2016: IJF en Pesaro. TEJO plene organizis tion.
AMO 27: PL Aŭg 2016: IJK en Vroclavo. TEJO plene organizis tion.
AMO 30: DE Mar 2017:  En Munkeno, TEJO plene organizis tion apoge de subvenciado.
AMO 32  IT Apr 2017: En IJF pri trejnado de trejnistoj, kun subvenciado.
AMO 42: US Jan 2018: Kunlaboro de SS kaj usonanoj.
AMO 55: VN Apr 2019: Kunlaboro de VPEA kaj la vjetnama junularo.
AMO 69: PL: Nov 2020: Varbado de junuloj en Eŭropo. Seminario en Vroclavo.

# Dozo da masko - kastela

La franca Esperanto-kastelo produktigis sian propran maskon el ŝtofo (*SMG: Damasko?*), lavebla, laŭnorma. Por koresponde mendi ĝin kontraŭ 9 eŭroj, skribu al kastelo@gresillon.org




La surskribo instigos homojn demandi vin pri la signifo, do informi pri Esperanto. Ĝia foto videblas malsupre en la PDF kaj sub tiu ĉi ligilo.

Senkoste ricevos ĝin kiu aliĝos ekde nun al nia oktobra staĝo AŬTUNE: gresillon.org/a

# Jen du eroj el tiu oktobra sesio

## *Vivkadra Simulado*

Komencintoj aŭ progresantoj en la lingvo Esperanto (KER-niveloj A2-B1-B2), mi invitas vin al semajna studperiodo per moderna metodo : Vivkadra Simulado. Tio okazos tra la semajno de okt. 19-25. Mi kuntiros vin en strangan gastejon, kie vi travivos paroligajn situaciojn, kie

gramatikumante vi fortigos viajn konojn, kie vi malkovros plej diversajn lernigajn ludojn, kaj ĉefe kie vi praktikos vian Esperanton! Fantaziu, amuziĝu … kaj lernu!

Elizabet Le Dru

gresillon.org/koruso

gresillon.org/aligho

La aŭtuna sesio okazos en tu partoj, okt 19-25 (precipe ĥoristoj) kaj okt 25-31.

**19.-25.okt.2020** - **Multaktivecaj tagoj** - gresillon.org/koruso

Vivkadra Simulado, kurso A2-B1-B2 kun Elisabeth Le Dru

- Migrado esperantlingva kun lingva bano, kun Olivier Buisson
  Ĥora kantado kun Interkant kaj Zdravka Bojĉeva

LandArt, Arto kaj Naturo kun Nathalie Dubrulle

**25.okt.-1.nov.2020** - **kursaro AŬTUNE** - gresillon.org/autuno

Paroligo kaj Polurado, kurso B2-C1 kun Tim Morley (Cambridge)
Kurso por progresantoj A2-B1 kun Laurent Peuch
Kurso por komencantoj A1-A2 kun Maja Mériaux
Praktikado de Esperanto per ludoj por infanoj kun Elisabeth Barbay
Teatra ateliero kun Laurent Peuch

## *AMO 68 - progresraporto*

Tio okazos en du tagoj, oktobro 27 kaj 29 inter 16:00 kaj 18:30 CET. La temo estos 'La rolo de Esperanto-Centroj' kaj ni jam havas kontribuojn pri Greziljono (FR), Herzberg am Harz (DE), Seulo (KR), Vroclavo (PL) kaj la Eo-centro en Ruando. Prezentaĵoj de aliaj centroj ege bonvenas! Anoncu vin!

## Stumblamo

Lamo bedaŭrinde karakterizas la sorton de AMO 67, devinta okazi kadre de la tre sukcesa Konferenco pri Scienco kaj Tekniko (KAEST). Spite vastajn alvokojn, estis pretigita nur unu prezentaĵo, kiu efektive sukcese trovis lokon en la programaro de KAEST. Sed, same kiel unu hirundo ne heroldas printempon, unu prezentaĵo ne povas konsistigi AMO-seminarion. La numerigo de la AMO-serio ne estos modifita, do restas AMO 68 en Greziljono kaj AMO 69 (pri rejunigo de la komunumo en Eŭropo) fine de novembro.

======= Vortoj: 930 ======

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis 2020/33. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.